Joh.. H: Petersen,

# Lingvo internacia

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ho kara lingvo ci!
Laŭdas vin laŭte ni
Per vort' kaj kant'.
Interkomprenon ci
Semas ja inter ni,
Ponton konstruas ci
De land' al land'.

Ho kara lingvo ci,
Estos fidelaj ni,
kiel fratar'.
Vi ja kunligas nin,
Kore ni amas cin.
Pacon instruu ci
Al la homar'!

Ho kara lingvo ci,
Donas promeson ni
Kun sankta ĵur'.
La vojon iru ni,
Kiun elmontras ĝi
En korojn metu ci
Senton de pur'.

...

Ho kara lingvo, ja
Regu eterne la
Pac' en la mond'!
Kredu ni ĉiuj ĝin:
Venkos ni je la fin'.
Donu esperon ci
Al frata rond'!

*Traduko de la Esperanta poemo "Lingvo internaci"' de Joh.. H: Petersen en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 2008-11-17.*

*MR-472-1 / Arg-813-1631 (2013-02-03 10:37:59)*

*Mi, Manfred Retzlaff, aliverkis la tekston en 2005-11-15; ĉar mi pensis, ke la adjektivan finaĵon "-a" en la vorto "internacia" oni ne rajtas elizii.*